ESPERANTA BIBLIOTEKO INTERNACIA

N-o 7

EL DRAMOJ

Fragmentoj de Ifigenio en Taŭrido de Goethe kaj de La Rabistoj de Schiller

Tradukis

Dro L. L. Zamenhof

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.
Berlin kaj Dresden

GERMANA ESPERANTISTO

Monata gazeto por la disvastigo de la lingvo Esperanto kun instrua kaj literatura aldono

ESPERANTO-PRAKTIKO

Ĉefredaktoro: Friedrich Ellersiek

Respondeca redaktoro: Arnold Behrendt

La plej malnova el la nun ekzistantaj E-gazetoj, redaktata ĉefe nur en Esperanto. Ĝia ĉiam interesa enhavo konsistas el originalaj aŭ tradukitaj artikoloj pri plej diversaj temoj, propagando, kroniko, literaturo, ekzercoj por komencantoj kaj progresantoj, prilingvaj demandoj, konkursoj, bibliografio, korespondo ktp.

Pri abonprezo oni demandu la eldonejon.

Por specimena numero oni sendu 0.25 Gm. aŭ 1 novan respond-kuponon, kiuj ĉe abono estos repagataj laŭ deziro.

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G.m.b.H.

Berlin SW 61, Wilms-Straße 5

ESPERANTA BIBLIOTEKO INTERNACIA

N-o 7

EL DRAMOJ

Fragmentoj de Ifigenio en Taŭrido de Goethe kaj de La Rabistoj de Schiller

Tradukitaj el germana lingvo de
Dro L. L. Zamenhof

2a eldono
(4a—8a miloj)

1924

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.
Berlin kaj Dresden

KSIĄŻNICA PODLASKA
im. Łukasza Górnickiego
Nr 134609
Czytelnia Książek
w Białymstoku

Exp.

821.1122-2-822

Tiu ĉi represo estas permesita de la firmo Hachette & Cie., Paris, eldoninto de la kompletaj verkoj.

IFIGENIO EN TAŬRIDO

Personoj:

Ifigenio
Toas, reĝo de la Taŭridanoj
Oresto
Pilado

Loko de agado: arbareto antaŭ la templo de Diano

Akto unua

Sceno unua

IFIGENIO (sola)

Al via ombro, pintoj moviĝemaj
De l' densa kaj antikva arbareto,
Al la sanktej' kvieta de l' diino
Ankoraŭ nun kun trema sent' mi iras,
Simile kiel la unuan fojon:
Ne povas mi al vi alkutimiĝi.
Jam multajn jarojn min ĉi tie kaŝas
Plej alta volo, kiun mi obeas;
Mi tamen ĉiam sentas min nur fremda.
Ĉar ve! transmare estas miaj karaj!
Mi longajn tagojn staras sur la bordo,
Serĉante per la kor' la Grekan landon;
Al miaj ĝemoj nur per surdaj tonoj
Respondas la ondegoj de la maro.
Ho ve al tiu, kiu devas vivi
For de l' gepatroj kaj de la gefratoj!
Malĝojo al li rabas la feliĉon;
Forvagas flanken ĉiam liaj pensoj
Al la gepatra domo, kie suno
Al li aperis la unuan fojon,
Kaj samdomanoj ĉiam pli kaj pli
En ludo alligiĝis reciproke.
La diojn mi ne juĝas; tamen vere
Plendinda estas stato de virino.

En domo kaj milit' la viro regas,
En fremda land' li ankaŭ al si helpas;
Li la posedon, li la venkon ĝuas,
Eĉ lia morto estas morto glora.
Sed la virinon ĉio ĉirkaŭbaras!
Eĉ krudan edzon obeadi estas
Por ŝi ne sole devo, sed konsolo;
Sed kiel mizerega ŝi fariĝas,
Se en fremdlandon pelis ŝin la sorto!
Ĉi tie Toas, nobla viro, tenas
Min en katenoj sanktaj, tamen sklavaj.
Kun honto mi konfesas, ke mi servas
Al vi, diino, mia savintino,
Nur kontraŭvole! Tamen mian vivon
Al vi dediĉi devus mi libere!
Al vi, Diano, ĉiam mi esperis,
Ankoraŭ nun esperas mi senĉese.
Vi min, filinon de plej granda reĝo,
En vian sanktan aman brakon prenis,
Por savi de la morto. Ho, diino,
Se tiun grandan viron, kiun vi
Turmentis, postulante la filinon,
Kaj li al vi oferis la plej karan, —
Se la Agamemnonon disimilan
Vi de la Trojaj muroj disbatitaj
Venigis glore en patrujon lian,
Se vi al li konservis la edzinon,
Elektron kaj la filon, la trezorojn:
Vi ankaŭ min redonu al la miaj
Kaj min, savinte de la morto, savu
De l' ĉi-tiea vivo, dua morto!

Sceno tria

IFIGENIO. TOAS.

IFIGENIO

Per la plej belaj donoj kaj trezoroj
Vin benu la diino! Al vi ĉiam
Ŝi donu venkon, gloron kaj riĉecon,
Bonstaton por la viaj kaj plenumon
De ĉiu via nobla ekdeziro!
Ke vi, kiu tre multajn zorge regas,
Feliĉon ankaŭ multigitan havu!

TOAS

Mi ĝojus, se min glorus la popolo,
Ke tion, kion mi akiris, ĝuas
Aliaj pli ol mi. La plej feliĉa —
Ĉu reĝo, ĉu simplulo — estas homo,
Se lin ĝojigas lia propra domo.
Vi partoprenis en doloro mia
La tagon, kiam glav' de malamiko
De mia flanko rabis mian filon,
La lastan, la plej bonan. Tiel longe,
Dum mia koro estis okupita
De la spirit' de venĝo, mi ne sentis
La dezertecon de loĝejo mia;
Sed nun kontentigita mi revenas,
La malamikan regnon mi detruis
Kaj mia filo estas jam venĝita, —
Nun en la tuta mia domo restas
Nenio, kio povus min ĝojigi.
La gajan obeadon, kiu lumis
Por mi ĝis nun el la okul' de ĉiu,

Nun ombras zorgo kaj nekontenteco.
Jam ĉiu pensas pri la estonteco
Kaj senfilulon sekvas nevolonte.
Mi venas nun en tiun templon, kiun
Mi vizitadis ofte, por elpeti
La venkon, aŭ por danki por la venko.
En mia brusto portas mi deziron
Malnovan, kiu certe por vi ankaŭ
Ne estas nekonata: mi esperas,
Ke por la beno al popolo mia
Kaj al mi mem mi enkondukos vin
En mian domon kiel fianĉinon.

IFIGENIO

Ho reĝo! Al knabino nekonata
Tro multe vi oferas. Hontigita
Nun staras antaŭ vi la fremdulino,
La elpelita, kiu sur la bordo
Nenion serĉis krom rifuĝo paca,
Kaj tion vi al mi sufiĉe donis.

TOAS

Ke la devenon vian antaŭ mi
Vi ĉiam kaŝas, reĝon ofendante, —
Neniu gento povus ĝin toleri.
Timigas nia bordo la fremdulojn:
Postulas tion leĝ' kaj neceseco;
Sed vi ja ĝuas ĉiujn leĝajn rajtojn,
Vi, plej afable akceptita gasto,
Laŭplaĉe disponanta sian tagon, —
De vi konfidon mi esperis, kiun
Meritas mastro por la gastameco.

IFIGENIO

Se kaŝis mi la nomon de l' gepatroj,
Ho, mia reĝo, kredu, mi ĝin faris
Pro embaraso, ne pro malkonfido.
Ĉar ve! tre povas esti, ke se vi
Ekscius, kiu antaŭ vi troviĝas
Kaj kian sorte malbenitan kapon
Vi nutras kaj defendas, terurego
Atakus tiam vian grandan koron;
Anstataŭ sur la tronon min inviti,
Vi eble min elpelus el la regno,
Kaj antaŭ ol atingus mi revenon
Al mia hejmo, finon de l' vagado,
Vi puŝus min al la mizero, kiu
Fariĝas ĉie la terura sorto
De ĉiu elpelito kaj vaganto.

TOAS

Nu, kiel ajn pri vi la dioj pensas
Kaj kion ajn pri via dom' decidis, —
Mi tamen scias, ke de l' tempo, kiam
Ĉi tie vi aperis kaj ĉe ni
Vi ĝuas plenmezure gastamecon,
Ne mankas al ni beno de l' ĉielo.
Ne estus tre facile min konvinki,
Ke mi en vi protektas kulpan kapon.

IFIGENIO

Vin benas la bonfaro, ne la gasto.

TOAS

Boneco por krimul' ne donas benon;
Ĉesigu do silenton kaj malfidon!

Ne maljustulo tion ĉi postulas.
Al mi vin la diino enmanigis,
Kaj kiel ŝi, mi ankaŭ vin protektas,
Kaj ŝia volo estu por mi leĝo:
Se povas vi reveni en la hejmon,
Mi tiam vin de ĉio liberigas;
Sed se la vojo estas jam barita
Al vi por ĉiam, aŭ se via gento
El sia lando estas elpelita
Aŭ eĉ fatale tute estingita,
Vi tiam ĉiurajte estas mia.
Parolu do malkaŝe, kaj vi scias,
Ke mi neniam rompas mian vorton.

IFIGENIO

De la ligil' malnova nevolonte
La lango liberiĝas, por nun fine
Malkaŝi, kion kaŝis mi tre longe;
Ĉar se sekreton oni unu fojon
Al iu elkonfidas, ĝi forlasas
Por ĉiam la gardejon en la koro
Kaj malutilas, aŭ ĝi iufoje
Utilas, se la dioj tion volas.
Aŭskultu! Mi devenas de Tantalo.

TOAS

Kviete vi eldiris grandan vorton!
Ĉu tiu estas via gentopatro,
Pri kiu aŭdis ja la tuta mondo,
Ke estis li plej granda favorato
De la diaro? Ĉu li estas tiu
Tantalo, kiun Jupiter' invitis
Al sia tablo kaj al konsiliĝo

Kaj kies spertoriĉajn saĝajn vortojn
La dioj mem kun ĝuo aŭskultadis,
Simile al parol' de orakolo?

IFIGENIO

Li estas tiu sama. Sed la dioj
Ne devas tro kun homoj amikiĝi:
Ĉar mortemuloj estas tro malfortaj,
Por sen kapturno teni sin tro alte.
Ne estis li malnobla perfidulo,
Sed nur tro granda, por sin senti sklavo,
Kaj tro malgranda por kunul' de dio,
Kaj lia peko estis ja nur homa.
Severa estis la dekret' de l' dioj,
Kaj la poetoj kantas, ke perfido
Kaj granda fiereco lin por ĉiam
De l' tablo Jupitera defaligis
Kun granda malhonor' en la Tartaron.
Kaj ve! la tuta gento sur si portas
Eterne la koleron de la dioj.

. . . . . .

TOAS

. . . . . Vi plenumu
La devon vian, mi plenumos mian.
Du fremdaj viroj, kiujn ĵus ni trovis
Kaŝitajn en surbordaj la kavernoj
Kaj kiuj ne alportas al ni bonon,
En miaj manoj estas nun. En ili
Diino via havu nun denove
La longe jam mankantajn oferdonojn!
Mi ilin sendos: vi la servon konas.

Sceno kvara

IFIGENIO (sola)

Vi havas nubojn, ho savantino,
Por kovri senkulpajn persekutatojn
Kaj per la vento ilin forporti
De la fera kruela fatalo,
Trans la maron, trans multajn landojn
Ilin forporti, kien vi volas.
Vi estas saĝa, la estontaĵon
Kaj la pasintaĵon vi konas precize;
Via rigardo gardas la viajn,
Kiel via lumo, la vivo de l' noktoj,
Gardas kaj regas tutan la teron.
Miajn manojn detenu de sango!
Benon kaj pacon neniam ĝi donas;
Kaj la fantomo de mortigito
En horoj malĝojaj de la mortiginto
Lin atakas kaj lin turmentas.
Ĉar la senmortuloj amas la homojn,
La bonajn gentojn kaj generaciojn,
Kaj ili volonte longigas la vivon
De mortemulo, kaj ili volonte
Al li ebligas ĝui kelktempe
Kune kun ili la ĝojan vidon
De propra ilia eterna ĉielo.

Akto dua

Sceno unua

ORESTO. PILADO.

ORESTO

Ni iras nun la vojon de la morto:
Animo mia grade trankviliĝas.
Mi Apolonon petis, li forigu
De mia flanko la teruran bandon
De l' venĝfantomoj, kaj en liaj vortoj
Misteraj tiam sentis mi promeson,
Ke trovos mi la helpon kaj la savon
En la sanktejo de fratino lia,
La regantino de la Taŭridanoj.
Ĝi plenumiĝas: tuta la mizero
Finiĝos nun kun mia vivo kune!
Al mi, al kiu dia mano premas
La koron kaj surdigas la spiriton,
Ja estas tiel ĝoje kaj facile
Adiaŭ diri al la lum' de l' suno!
Kaj se ne devas nepoj de Atreo
Kun kron' de venko fali en batalo,
Se mi, simile al prapatroj miaj,
Perei devas kiel oferbesto:
Ĝi plenumiĝu! Estas ja pli bone
Ĉi tie morti antaŭ la altaro,
Ol en angulo malbenita, kie
Mortigus nin parenco-insidanto.
Ho, lasu min almenaŭ nun ripozi,

Vi, subteruloj, tiel avidantaj
La sangon, kiu ĉiun mian paŝon
Gutante signas! Lasu min ripozi,
Jam baldaŭ mi malsupren al vi venos.
Nek min, nek vin la lum' de l' tago vidu,
Kaj la tapiŝo verda de la tero
Ne estu plu svarmejo por fantomoj.
Mi venos al vi tien sub la teron,
Kaj tie en senviva surda nokto
Egala sorto ĉiujn unuigos.
Nur vin, Pilad', senkulpa kamarado
De mia nigra sorto kaj malbeno,
Ho, kiel malvolonte mi kunprenas
En la funebran landon antaŭtempe!
Nur via vivo, via morto kaŭzas
Al mi ankoraŭ timon aŭ esperon.

PILADO

Ne iras mi ankoraŭ kiel vi
Pasive en la regnon de la ombroj.
Tra la vojetoj konfuzitaj, kiuj
Konduki ŝajnas al la nigra nokto,
Mi penas nin traŝovi al la vivo.
Pri morto mi ne pensas; mi meditas,
Ĉu eble iel helpos nin la dioj,
Rimedon ian trovi por forkuro.
La morto — ĉu vi timas aŭ ne timas —
Ja venos mem. Eĉ kiam la pastrino
Jam levos sian manon, por detranĉi
Al ni oferdediĉe niajn buklojn,
Eĉ tiam via savo kaj la mia
Ne ĉesos esti mia sola penso.
Forĵetu la malĝojon, ĉar per dubo

Akcelas ni danĝeron. Apolono
Al ni promesis, ke en la sanktejo
De la fratin' atendas nin konsolo
Kaj helpo kaj reveno. Kaj dusencaj
Neniam estas vortoj de la dioj,
Kiel tre ofte pensas la prematoj.
. . . . . .

ORESTO

Mi ŝatas nur kuraĝon rektaniman.

PILADO

Ne petis tial mi de vi konsilon.
Jam unu paŝon faris mi. Jam multe
Da scioj mi ellogis de l' gardistoj.
Mi scias jam, ke fremda, disimila
Virin' katenas tiun sangan leĝon;
Nur puran koron, preĝon, odorfumon
Al dioj ŝi oferas. Ŝian koron
Tre multe oni laŭdas; oni pensas,
Ke ŝi devenas de amazoninoj,
Ke ŝi forkuris, por ke ŝi per tio
Evitu ian grandan malfeliĉon.

ORESTO

Videble nun potenco ŝia luma
La forton perdis pro la proksimeco
De la krimulo, kiun la malbeno
Ĉirkaŭas, kiel vasta nigra nokto.
La pia sangavido liberigas
De la katenoj la antikvan moron,
Por nin nun pereigi. La sovaĝa
Spirito de la reĝo nin mortigos;
Se li koleras, tiam nin virino
Ne povas savi.

PILADO

Bone al ni estas,
Ke de virin' dependas nia sorto!
Ĉar viro, eĉ plej bona, kutimigas
Spiriton sian al la krueleco,
Kaj fine li eĉ leĝon al si faras
El tio, kion mem li abomenas,
Kaj la kutimo faras lin malmola
Kaj eĉ nerekonebla. Sed virino
Obstine ĉiam sekvas sian senton,
Kaj en la bono kaj en la malbono
Ŝi estas pli fidebla . . . Ts! ŝi venas!
Nin lasu solaj! Mi ne devas tuj
Eldiri niajn nomojn aŭ konfidi
Al ŝi tro nesingarde nian sorton.
Foriru! Antaŭ ol ŝi ekdeziros
Kun vi paroli, mi kun vi parolos.

Sceno dua

IFIGENIO. PILADO.

IFIGENIO

Fremdulo, diru, kiu kaj el kie
Vi estas. Mi vin trovas pli simila
Al greko, ol al skito.
(Ŝi deprenas liajn ĉenojn.)
Tre danĝera
La libereco estas, kiun mi
Nun al vi donas; ho, la bonaj dioj
Deturnu tion, kio vin minacas!

PILADO

Ho, dolĉa voĉo! Agrablega sono
De l' hejma lingvo en la fremda lando!

La bluajn montojn de l' haven' patruja
Mi, la kaptito, vidas nun denove
Kun ĝojo antaŭ la okuloj miaj.
Ho jes, ho jes, mi ankaŭ estas greko!
Mi por momento tute ja forgesis,
Kiome mi bezonas vin! mi glutis
Per la okul' ĉielan la aperon.
Ho, se decido de pli alta forto
Ne ŝlosas vian buŝon, diru, diru,
El kiu el la grekaj niaj gentoj
Vi, dia ido, havas la devenon.

IFIGENIO

Pastrino, kiun la diino mem
Por si elektis kaj al si dediĉis,
Parolas nun kun vi; ĉi tio devas
Al vi sufiĉi. Diru al mi, kiu
Vi estas, kia sorto malfeliĉa
Kun la kunul' vin tien ĉi venigis.

PILADO

Facile mi rakonti al vi povas
La sorton, kiu pelas nin kruele.
Ho, se kun tia sama facileco
Vi povus nin ĝojigi per espero!
El Kret' ni estas, filoj de Adrasto:
Mi, la plej juna, nomas min Kefalo,
Li, la plej aĝa, estas Laodamas.
Kaj meze inter ni ankoraŭ estis
Alia frato, kruda kaj sovaĝa,
Kaj tiu jam en la infanaj ludoj
Ne lasis al ni pacon kaj konsenton.
Dum nia patro antaŭ Troj' batalis,
Kviete ni sekvadis la patrinon;

Sed kiam li kun riĉa hav' revenis
Kaj baldaŭ poste mortis, la disputo
Pri regno kaj heredo tuj disigis
La fratojn. Mi min tenis sur la flanko
De la plej aĝa. Tiu ĉi mortigis
La fraton. Kaj pro tiu sanga krimo
Lin la furioj pelas senripoze.
Sed al ĉi tiu senkultura bordo
Nin sendis Apolono kun espero.
En la sanktejo de l' fratino sia
Ordonis li al ni atendi helpon.
Nin oni kaptis kaj al vi venigis
Por oferfaro. Tion vi jam scias.

IFIGENIO

Ĉu Trojo falis? Ho, karul', certigu!

PILADO

Ĝi falis, jes. Kaj vi al ni certigu
La savon! Rapidigu vi la helpon,
De l' dio promesitan! Ekkompatu
Vi mian fraton! Diru al li baldaŭ
Bonkoran vorton! Tamen parolante
Kun li, vi lin indulgu, mi vin petas;
Ĉar ĝojo kaj dolor' kaj rememoro
Facile lian tutan internaĵon
Ekskuas tro danĝere; tiam baldaŭ
Frenezo febroforma lin atakas,
Animo lia bela kaj libera
Fariĝas tiam havo de l' furioj.

IFIGENIO

Kiome ajn vi estas malfeliĉa,
Mi vin petegas, ĉion vi forgesu,
Ĝis vi sopiron mian kontentigos.

KSIĄŻNICA PO
im. Łukasza Gó
Nr
Czytelnia Ks
w Bielsku

PILADO

La alta urbo, kiu tra dek jaroj
La tutan grekan forton kontraŭstaris,
Prezentas nun ruinojn, kaj neniam
Ĝi releviĝos. Tamen multaj tomboj
De la plej bonaj grekoj nin devigas
Memori tiun bordon de l' barbaroj.
Aĥilo falis, kaj amiko lia . . .

IFIGENIO

Ho, diaj bildoj, vi fariĝis polvo!

PILADO

Kaj Palamed', Telamonid' Ajakso
Jam la patrujan sunon ne revidis.

IFIGENIO (al si mem)

Pri mia patro li nenion diras
Kaj lin ne nomas inter la falintoj.
Ho jes! li vivas! Jes, mi lin revidos!
Ho, mia kor', esperu, mia koro!

. . . . . .

IFIGENIO (sin kovrante)

Sufiĉe! Nun vi baldaŭ min revidos.

PILADO (sola)

La sort' de l' reĝa domo ŝin videble
Profunde tuŝas. Kiu ajn ŝi estas,
Ŝi tute certe mem la reĝon konis.
Feliĉe do por ni, el alta domo
Ĉi tien oni vendis ŝin. Ho koro,
Ne batu tiel forte! Al la stelo,
De la espero, kiu ekbriletis,
Ni remu do kuraĝe kaj prudente!

Akto tria

Sceno unua

. . . . . .

ORESTO

Sufiĉe! La animo via granda
Per falsa vort' ne estu plu trompata!
Fremdulo por fremdulo povas teksi
Mensogon kaj ruzaĵon, por faligi
Lin en la reton; inter ni ekzistu
Nur vero!
Mi estas mem Oresto! Kaj ĉi tiu
Krimula kap' kliniĝas al la tombo
Kaj serĉas morton. Kaj en ĉia formo
Mi estas preta vole ĝin akcepti!
Ho, kiu ajn vi estas, mi al vi
Kaj al amiko mia malfeliĉa
Deziras savon; sed al mi la savon
Mi ne deziras. Se mi ne eraras,
Ĉi tie vi nur kontraŭvole restas;
Eltrovu do rimedon, por forkuri,
Sed min ĉi tie lasu. Mia korpo
Malsupren falu de la alta roko,
Ĝis maro fluu mia sang', portante
Malbenon al la bordo de l' barbaroj!
Vi iru, en la hejma greka lando
Komencu novan, pli feliĉan vivon!

. . . . . .

IFIGENIO

Ĉu povas vi aŭskulti bonan vorton?

ORESTO

Ĝin ŝparu por amato de la dioj!

IFIGENIO

Espero nova nun por vi eklumis.

ORESTO

Tra fumo nur briletas antaŭ mi
La mortriver', vokante al infero.

IFIGENIO

Ĉu vi fratinon havas nur Elektron?

ORESTO

Nur ŝin mi konis; ĉar la pli maljunan
Frutempe prenis for el la mizero
De nia domo ŝia bona sorto,
En kiu ni nur teruraĵon vidis.
Ho, ne demandu plu kaj ne aligu
Vin al la Erinioj. Kun kruela
Plezuro ili de l' animo mia
La cindron blovas for kaj ne permesas,
Ke la plej lastaj karboj, kiuj restis
De la terura brul' de nia domo,
En mia kor' kviete estingiĝu.
Ĉu tiu fajr', intence incitata,
Nutrata per sulfuro de l' infero,
Eterne en animo mia brulos?

IFIGENIO

Mi dolĉan odoraĵon nun enportas
En tiun fajron. Pura spir' de amo

Per delikata blov' malvarmetigos
La ardon, kiu bakas vian bruston!
Oresto, mia kara! Ĉu ne povas
Vi min kompreni? Ĉu de l' akompano
De la teruraj diaj punantinoj
La sang' en viaj vejnoj elsekiĝis?
Ĉu el la kapo de Gorgon' penetris
Ŝtoniga sorĉo ĉiujn viajn membrojn?
Se elverŝita sango de patrino
Per surda voĉo vokas al infero, —
Ĉu pura bena vorto de fratino
Ne vokos dian helpon de Olimpo?

ORESTO

Ĝi vokas! Ha, ĉu tiel vi deziras
Pereon mian? Ĉu en vi sin kaŝas
Diin' de venĝo? Kiu do vi estas,
Vi, kies voĉo kruelege turnas
La plej profundan mian internaĵon?

IFIGENIO

Eksentu do la voĉon de la koro:
Orest'! ĝi estas mi, Ifigenio!
Mi vivas!

ORESTO

Vi!

IFIGENIO

Ho, frato!

ORESTO

For! ho, for!
Ne tuŝu miajn buklojn! Ĉar, simile
Al la edziĝa vesto de Kreuzo,

Per nevenkebla fajro mi infektas.
Foriru! Kiel iam Herkuleso,
Mi devas preni morton izolite.

IFIGENIO

Vi ne pereos! Ho, se mi nur povus
Trankvilan unu vorton de vi aŭdi!
Forigu mian dubon, ho, certigu,
Certigu al mi tute la feliĉon,
Pri kiu tiel longe mi petegis.
Ĉar rado de doloro kaj de ĝojo
En mia kor' ruliĝas. De l' fremdulo
Forpuŝas min la timo; sed plej forte
Min la interno tiras al la frato.

ORESTO

Ĉu staras mi en templo de Lieo?
Ĉu furioza puŝo de pasio
Atakis nun subite la patrinon?

IFIGENIO

Ho, aŭdu min! Ho, vidu, kiel fine
Post longa, longa tempo mia koro
Nun malfermiĝis por la granda ĝojo,
Ke al la sola kaj al la plej kara
El ĉio, kio en la tuta mondo
Por mi ankoraŭ restis, mi nun povas
La kapon kisi; ke per miaj brakoj,
Ĝis nun nur al la vento etenditaj,
Mi fine vin nun povas ĉirkaŭpreni!
Ho, lasu! lasu! Ĉar eĉ de l' Parnaso
La fonto, kiu saltas en la valon,
Ne fluas tiel pure, tiel hele,

Kiel nun fluas senmezura ĝojo
El mia koro, fluas kaj ĉirkaŭas
Min kiel granda ondoplena maro.
Oresto! Ho, Oresto! Mia frato!
. . . . . .

Sceno tria

ORESTO, IFIGENIO, PILADO.

ORESTO

Ĉu ankaŭ vi jam venis malsupren?
Bonvenon, fratino! Sed mankas Elektro!
Ŝin ankaŭ sendu al ni plej baldaŭ
Ia bona dio per sago kompata!
Nur vin mi bedaŭras, malfeliĉa amiko!
Ho, venu, venu al la tron' de Plutono,
Kiel novaj gastoj ni salutu la mastron!

IFIGENIO

Ho, vi, gefratoj, kiuj de l' ĉielo
En tag' kaj nokto al la homoj donas
La belan lumon, sed ne rajtas lumi
Al la mortintoj, — savu nin, gefratojn!
Ho, vi Diano, kiu vian fraton
Amegas pli ol ĉion en la mondo
Kaj la vizaĝon virgan kun sopiro
Direktas al eterna lia lumo, —
Ne lasu do, ke mia sola frato,
Malfrue retrovita, furiozu
En la mallumo de la frenezeco!
Se via vol', pro kiu vi ĉi tie
Min kaŝis, nun jam estas plenumita,
Se min per li kaj lin per mi vi volas

Mirakle savi, tiam liberigu
Lin de l' katenoj de l' malbeno lia,
Ke la tre kara tempo de la savo
Por ĉiam ne forflugu!

PILADO

Ĉu vi rekonas nin? Ĉu vi rekonas
La sanktan arbareton kaj la lumon?
Ĉi ja ne povus lumi por mortintoj!
Ĉu sentas vi la brakojn de l' amiko
Kaj de l' fratino, kiuj vin ankoraŭ
En plena vivo tenas? Palpu forte!
Ne estas ni fantomoj. Konvinkiĝu!
Rekonsciiĝu! Ĉiu minuteto
Nun estas kara; nia savo pendas
Nun sur faden' malforta, kiun ŝpinas
Por ni, videble, ia bona Parko.

ORESTO (al Ifigenio)

Ho, lasu min je la unua fojo
En viaj brakoj ĝui puran ĝojon!
Vi, dioj, kiuj kun potenco flama
La ŝarĝon de l' nubegoj liberigas
Kaj la sopire petegitan pluvon
Kun bruo de ventego kaj de tondro
Sovaĝtorente verŝas sur la teron,
Sed baldaŭ la teruron de la homoj
Vi faras beno kaj la timon ŝanĝas
En ĝojon kaj en laŭtan dankon, kiam
En gutoj de folioj freŝegitaj
La nova sun' miloble speguliĝas
Kaj per afabla man' Iriso ŝiras
La grizan kovron de la lastaj nuboj:

Ho, lasu ankaŭ min nun en la brakoj
De la fratino, ĉe l' fidela brusto
De la amik' kun plena danko ĝui
Kaj teni, kion vi al mi donacis!
Forfalas la malbeno, tion diras
Al mi la koro; jam la Eŭmenidoj
Returne kuras nun al la Tartaro
Kaj tondre fermas feran la pordegon.
La ter' elspiras freŝon bonodoran
Kaj min invitas nove aspiradi
Al ĝoj' de l' vivo kaj al grandaj faroj.

PILADO

Rapidu, ĉar la tempo baldaŭ pasos!
La vento, kiu blovos niajn velojn,
Nur ĝi forportu nian plenan ĝojon
Al la Olimpo. Nun ni devas nepre
Rapide konsiliĝi kaj decidi.

Akto kvina

Sceno sesa

. . . . . .

ORESTO

. . . . . Reĝo!
Direktu vian koron al la paco!
Vi ne malhelpu, ke ŝi resanktigu
La patran domon, ke ŝi min redonu
Al la palaco pente purigita
Kaj kronu min per la antikva krono!
Redonu por la beno, kiun ŝi
Al vi alportis; rajton pli proksiman
Al ŝia frato nun permesu ĝui!
La forton kaj la ruzon, de la viroj
Plej grandan gloron, kovras nun per honto
La vero de ĉi tiu alta koro,
Kaj pura kaj infana konfideco
Al nobla vir' ricevas rekompencon.

IFIGENIO

Memoru vian vorton! La parolo
El la sincera kaj fidela buŝo
Vin tuŝu! Nin rigardu! La okazo
Por tia nobla far' ne ofte venas.
Vi ne rifuzos; cedu!

TOAS

Bone, iru!

IFIGENIO

Ne tiel, mia reĝ'! Sen via beno
Kaj kontraŭ via volo mi ne iros.
Nin ne forpelu! Ĉarma kora rajto
De reciproka gastameco ligu
Nin ambaŭ: kaj tiele ne por ĉiam
Ni estos disigitaj. Tiel same
Profunde, kiel mian propran patron,
Mi amas vin per mia tuta koro,
Kaj tiu sento restos por eterne.
Se iam eĉ la plej malgrava homo
El via gento al orelo mia
Alportos sonon de la lingvo, kiun
El via buŝo aŭdi mi kutimis,
Kaj sur la plej malriĉa mi rimarkos
La karan formon de la vesto via:
Mi tiam lin akceptos kiel dion,
Mi mem al li pretigos la kuŝejon,
Sidigos lin sur seĝo ĉe la fajro,
Demandos nur pri vi kaj via sorto.
La dioj al vi donu rekompencon
Por viaj faroj, via bonkoreco!
Adiaŭ! Turnu vin al ni kaj donu
Al mi elkoran vorton de disiĝo!
Ho, tiam pli kviete al la veloj
La vento blovos, kaj pli trankvilige
El la okuloj de la foriranto
Silentaj larmoj fluos. Ho, adiaŭ!
Por signo de antaŭa amikeco
La dekstran manon vi al mi etendu!

TOAS

Adiaŭ!

Fino

LA RABISTOJ

Personoj:

Maksimiliano, grafo de Moor

Karolo } liaj filoj
Francisko }

Amalio von Edelreich (= fon Edelrajĥ)

Hermano, bastardo de nobelo

Danielo, servisto de la grafo de Moor

Aliaj personoj ne aperas en tiu ĉi fragmento

Akto dua

Sceno dua

Dormoĉambro de la maljuna Moor

La maljuna Moor, dormante en apogseĝo.
Amalio.

Amalio, mallaŭte enirante. Malbrue, malbrue! li dormetas. (Ŝi stariĝas antaŭ la dormanto.) Kiel bela, kiel honorinda! honorinda, kiel oni pentras la sanktulojn. Ne, mi ne povas vin koleri! Blankhara kapo, vin mi ne povas koleri! Dormu trankvile, vekiĝu gaje, mi sola iros kaj suferos.

Maljuna Moor, sonĝante. Mia filo! mia filo! mia filo!

Amalio, prenas lian manon. Aŭdu, aŭdu! Lia filo estas en liaj sonĝoj.

Maljuna Moor. Ĉu vi estas ĉi tie? ĉu efektive vi? Ha, kiel mizere vi vidiĝas! Ne rigardu min per tiu ĉi malĝojega rigardo! mi estas jam sufiĉe mizera.

Amalio, vekas lin rapide. Vekiĝu, kara maljunulo! Vi nur sonĝas. Rekonsciiĝu!

Maljuna Moor, duone vekiĝinta. Li ne estis ĉi tie? ĉu mi ne premis liajn manojn? Malbona Francisko! ĉu vi deziras eĉ el miaj sonĝoj lin elŝiri?

Amalio. Vi rimarkas, Amalio?

Maljuna Moor, revigliĝas. Kie li estas? Kie mi estas? Vi ĉi tie, Amalio?

Amalio. Kiel vi vin sentas? Vi havis sanigan dormon.

Maljuna Moor. Mi sonĝis pri mia filo. Kial mi ne daŭrigis sonĝi? Eble mi ricevus pardonon el lia buŝo.

Amalio. Anĝeloj ne koleras, — li vin pardonas. (Ŝi prenas lian manon malĝoje.) Patro de mia Karolo, mi vin pardonas.

Maljuna Moor. Ne, mia filino! Tiu ĉi morta koloro de via vizaĝo kondamnas la patron. Malfeliĉa knabino! Mi senigis al vi la ĝojojn de via juneco, — ho, ne malbenu min!

Amalio, karese kisas lian manon. — Vin?

Maljuna Moor. Ĉu vi konas tiun ĉi portreton, mia filino?

Amalio. De Karolo!

Maljuna Moor. Tian vidiĝon li havis, kiam li komencis sian deksesan jaron. Nun li estas alia. . . . Ho, furioza mordado estas en mi interne. . . . Tiu ĉi moleco de la trajtoj fariĝis indigno, tiu ĉi rideto fariĝis malespero. Ne vere, Amalio? Ĝi estis en lia datreveno de naskiĝo, en la jasmena laŭbo, vi lin pentris? Ho, mia filino? Via amo tiel feliĉigis min.

Amalio, ĉiam rigardante la portreton. Ne, ne! Ĝi ne estas li. Per Dio, ĝi ne estas Karolo. Ĉi tie, ĉi tie. (Montrante la koron kaj la frunton.) Tiel tuta, tiel alia! La pala kolorilo ne sufiĉas, por kopii la ĉielan spiriton, kiu

regis en lia fajra okulo. For kun ĝi! Ĝi estas tiel homa! Mi estis fuŝistino.

Maljuna Moor. Tiu ĉi bonkora, varmiga rigardo, — se li starus antaŭ mia lito, tiam mi vivus en la morto mem! Neniam, neniam mi mortus!

Amalio. Neniam, neniam vi mortus? Ĝi estus salto, kiel oni saltas de unu penso al alia pli bela, — tiu ĉi rigardo lumus al vi trans la tombo; tiu ĉi rigardo portus vin super la stelojn.

Maljuna Moor. Estas malfacile, estas malĝoje! Mi mortas, kaj mia filo Karolo ne estas ĉi tie, — mi estas portata en la tombon, kaj li ne ploras super mia tombo! Kiel dolĉe estas, esti enlulata en la dormon de la morto per la preĝo de filo, — ĝi estas lulila kanto.

Amalio, reve. Jes, dolĉa, ĉiele dolĉa ĝi estas, esti enlulata en la dormon de la morto per kanto de amato, — eble oni ankaŭ en la tombo daŭrigas ankoraŭ sonĝi, — longa, eterna, senfina sonĝo pri Karolo, ĝis oni eksonigas la sonorilon de reviviĝo. . . (Rektiĝante, ravite) kaj de nun en liaj brakoj por eterne. (Paŭzo. Ŝi iras al la fortepiano kaj ludas.)

Ĉu Hektoro volas senrevene
Iri tien, kie kolerplene
Pro Patroklo buĉas la venĝanto?
Kiu do instruos vian filon
Timi diojn, uzi batalilon,
Se por ĉiam kovros vin la Ksanto?

Maljuna Moor. Bela kanto, mia filino. Vi devos ĝin ludi al mi, antaŭ ol mi mortos.

Amalio. Ĝi estas la disiĝo de Andromaĥo kaj Hektoro. — Karolo kaj mi ofte kantadis ĝin kun akompano de liuto. (Ŝi ludas plue.)

Karulin', haltigu vian ploron!
Al batalo lasu for Hektoron:
Vokas lin honoro de Pergamo.
Pro patruj' atendas min pereo,
Sed post glora mort', en Elizeo
Por vi ĉiam daŭros mia amo.

(Danielo eniras.)

Danielo. Ekstere atendas homo. Li petas, ke oni enlasu lin al vi; li diras, ke li havas gravan sciigon por vi.

Maljuna Moor. Por mi nur unu afero en la mondo estas grava, vi tion scias, Amalio. Ĉu ĝi estas malfeliĉulo, kiu bezonas mian helpon? Li ne foriru de ĉi tie kun ĝemado.

Amalio. Se ĝi estas almozulo, li rapide venu supren.

(Danielo foriras.)

Maljuna Moor. Amalio, Amalio, indulgu min!

Amalio, ludas plue. —

Jam ne sonas via batalilo,
Orfe kuŝos ruste la armilo,
Mortos for la gento de Priamo!
Vi foriros, kien lum' ne venas,
La Kocit' sin tra l' dezertoj trenas, —
En la Leto dronos via amo.

Ĉiu mia penso kaj prefero
Dronos en la Leto sub la tero,
Sed ne dronos am' de mia koro!
Aŭdu! Jam li vokas min sovaĝe. —
Ĉesu plori, tenu vin kuraĝe!
Ne, ne dronos amo de Hektoro!

(Francisko, Hermano maskita, Danielo.)

Francisko. Jen estas la homo. Li diras, ke teruraj sciigoj vin atendas. Ĉu vi povas ilin aŭskulti?

Maljuna Moor. Tia sciigo povas esti nur unu. Alproksimiĝu, mia amiko, kaj ne indulgu min! Donu al li pokalon da vino!

Hermano, per ŝanĝita voĉo. Via sinjora moŝto! Ne koleru malriĉan homon, se li kontraŭ sia volo traboros vian koron. Mi estas fremdulo en tiu ĉi lando, sed vin mi konas tre bone, vi estas la patro de Karolo de Moor.

Maljuna Moor. De kie vi tion ĉi scias?

Hermano. Mi konis vian filon.

Amalio, vivece. Li vivas? li vivas? Vi lin konas? kie li estas? kie, kie? (Volas forkuri.)

Maljuna Moor. Vi scias pri mia filo?

Hermano. Li studis en Lepsiko. De tie li komencis migradi, mi ne scias kiel malproksime. Li travagis Germanujon ĉirkaŭe kaj, kiel li diris al mi, kun nekovrita kapo, kaj li almoze elpetadis al si panon antaŭ la pordoj. Kvin monatojn poste komenciĝis denove la abomena milito inter Prusujo kaj Aŭstrujo, kaj ĉar li jam nenion en la mondo povis esperi, tial la sonoj de la venka tam-

buro de Frederiko fortiris lin Bohemujon. Permesu al mi, li diris al la granda Ŝverinido, ke mi mortu per la morto de herooj, — mi ne havas plu patron!

Maljuna Moor. Ne rigardu min tiel, Amalio!

Hermano. Oni donis al li standardon. Li aliĝis al la venka flugo de la Prusoj. La sorto faris, ke ni ambaŭ kuŝis sub unu tendo. Li multe parolis pri sia maljuna patro kaj pri pli bonaj pasintaj tagoj kaj pri detruitaj esperoj... niaj okuloj estis plenaj de larmoj.

Maljuna Moor, kaŝas sian kapon en la kusenon. Silentu, ho silentu!

Hermano. Ok tagojn poste estis la varmega batalo apud Prago. Mi povas diri al vi, via filo sin tenis kiel brava batalisto. Li faris mirindaĵojn antaŭ la okuloj de la armeo. Kvin regimentoj devis anstataŭi unu la alian, sed li staris. Fajraj kugloj faladis dekstre kaj maldekstre, sed via filo staris. Unu kuglo frakasis al li la dekstran manon, via filo prenis la standardon en la maldekstran, kaj li staris.

Amalio, ravite. Hektoro, Hektoro! Ĉu vi aŭdas? li staris!

Hermano. Mi renkontis lin en la vespero de la batalo, falintan sub la fajfado de kugloj; per la maldekstra mano li estis retenanta la torente elfluantan sangon, la dekstran li enŝovis en la teron. „Frato! — li ekkriis al mi — kuras la famo, ke la generalo antaŭ unu horo falis". — „Li falis, — mi diris, — kaj vi?" — „Nu, kiu estas brava soldato, —

li ekkriis kaj liberigis sian maldekstran manon, — tiu sekvu sian generalon, kiel mi!" Tuj li elspiris sian grandan animon.

Francisko, kolerege ekpaŝante kontraŭ Hermanon. Ho, la morto enŝlosu vian malbenitan langon! Ĉu vi venis ĉi tien, por doni al nia patro la baton de la morto? Patro! Amalio! Patro!

Hermano. Ĝi estis la lasta volo de mia mortanta kamarado. „Prenu tiun ĉi glavon, — li diris agoniante, — transdonu ĝin al mia maljuna patro; la sango de lia filo algluiĝis al ĝi, li estas venĝita, li ĝoju. Diru al li, ke lia malbeno pelis min al la batalo kaj morto, ke mi finis mian vivon en malespero!" Lia lasta ĝemo estis „Amalio".

Amalio, kiel vekita el morta dormo. Lia lasta ĝemo estis Amalio!

Maljuna Moor, terure kriante kaj elŝirante al si la harojn. Mia malbeno enpelis lin en la morton! li finis sian vivon en malespero!

Francisko, vagante tra la ĉambro. Ho, kion vi faris, patro! Mia Karolo, mia frato!

Hermano. Jen estas la glavo kaj jen estas ankaŭ portreto, kiun li samtempe elprenis el sur la brusto. Ĝi similas perfektege tiun ĉi fraŭlinon. — Ĉi tion al mia frato Francisko, li diris, — mi ne scias, kion li volis diri per ĉi tio.

Francisko, kvazaŭ tre mirigita. Al mi? la portreton de Amalio? Al mi?

Amalio, kolerege alpaŝante al Hermano. Malnobla, subaĉetita trompanto! (Kaptas lin furioze ĉe la brako.)

Hermano. Mi ne estas trompanto, moŝto fraŭlino. Rigardu mem, ĉu ĝi ne estas via portreto, — kredeble vi mem ĝin donis al li.

Francisko. Per Dio, Amalio, ĝi estas via portreto! Ĝi estas efektive via!

Amalio, redonas al li la portreton. Mia, mia! Ho, ĉielo kaj tero!

Maljuna Moor, kriante kaj gratante al si la vizaĝon. Ho ve, ho ve! Mia malbeno alpelis lin al la morto! pereis en malespero!

Francisko. Kaj li memoris pri mi en la lasta malfacila horo de la mortado, pri mi! Anĝela animo, — kiam la nigra standardo de la morto jam bruis super li... pri mi!...

Maljuna Moor, balbutante. Mia malbeno lin pelis al la morto, pereis mia filo en malespero!

Hermano. Mi ne povas elteni tian malĝojegon. Adiaŭ, maljuna sinjoro! (Mallaŭte al Francisko.) Ho, kial vi tion ĉi faris, sinjoro? (Rapide foriras.)

Amalio, saltleviĝante postkrias al li. Restu! restu! Kio estis liaj lastaj vortoj?

Hermano, haltante en la pordo. Lia lasta ĝemo estis Amalio. (Foriras.)

Amalio. Lia lasta ĝemo estis Amalio! Ne! vi ne estas trompanto! Sekve ĝi estas vero, vero, — li mortis, li mortis! (Vagas ŝanceliĝante kaj falas.) Mortis! Karolo mortis!

Francisko. Kion mi vidas! Kio estas tie sur la glavo? skribite per sango — „Amalio“!

Amalio. De li?

Francisko. Ĉu mi bone vidas aŭ mi sonĝas? Jen per sanga skribo: „Francisko, ne forlasu mian Amalion“. Vidu do, vidu do! Kaj sur la alia flanko: „Amalio! vian ĵuron nuligis la ĉiopova morto“. Ĉu vi nun vidas, ĉu vi vidas? li skribis ĉi tion per rigidiĝanta mano, li skribis ĉi tion per la varma sango de sia koro, li skribis ĝin sur la solena rando de la eterneco! Lia spirito prokrastis sian forflugon, por interligi ankoraŭ Franciskon kaj Amalion.

Amalio. Sankta Dio! Ĝi estas lia mano! Li neniam min amis! (Foriras rapide.)

Francisko, piedobatante la plankon. Al la diablo! mia tuta arto rompiĝas sur tiu ĉi obstina kapo!

Maljuna Moor. Ho ve! ho ve! Ne forlasu min, mia filino! Francisko, Francisko, redonu al mi mian filon!

Francisko. Kiu donis al li la malbenon? Kiu pelis sian filon al batalo, morto kaj malespero? Ho, li estis anĝelo, juvelo de la ĉielo. Malbeno al liaj mortigintoj! Malbeno, malbeno al vi mem!

Maljuna Moor, batas per la pugno siajn bruston kaj frunton. Li estis anĝelo, juvelo de la ĉielo! Malbeno, malbeno, pereo, malbeno al mi mem! Mi estas patro, kiu mortigis sian grandan filon. Min li amis ĝis la morto! Por venĝi pro mi, li kuris al batalo kaj morto! Ho, mi, monstro! monstro! (Furiozas kontraŭ si mem.)

Francisko. Li estas for, kion nun helpas tro malfruaj plendoj? (Sarkasme ridas.) Estas pli facile mortigi, ol revivigi. Vi neniam revenigos lin el lia tombo.

Maljuna Moor. Neniam, neniam, neniam mi revenigos lin el lia tombo! For, perdita por ĉiam! Kaj vi ellogis de mi la malbenon, vi, vi... Redonu al mi mian filon!

Francisko. Ne incitu mian koleron! Mi forlasos vin en la morto!

Maljuna Moor. Monstro! Monstro! Redonu al mi mian filon! (Saltleviĝas de la seĝo kaj volas kapti Franciskon ĉe la gorĝo, sed tiu ĉi lin reĵetegas.)

Francisko. Senfortaj ostoj! Vi kuraĝas... Mortu! Malesperu! (Foriras.)

Maljuna Moor. Mil malbenoj persekutu vin! Vi ŝtelis al mi mian filon el la brakoj. (Ĵetas sin malespere tien kaj reen en la seĝo.) Ho ve, ho ve! Malesperi kaj ne morti! Ili forkuras, ili forlasas min ĉe la morto, miaj bonaj anĝeloj forkuras de mi, ĉiuj sanktuloj forkuras de la malvarma griza mortiginto. Ho ve, ho ve! Ĉu neniu volas teni al mi la kapon, neniu volas liberigi la agoniantan animon? Neniom da filoj, neniom da filinoj, neniom da amikoj! Nur homoj... neniu volas?... Sola... forlasita... Ho ve, ho ve! Malesperi kaj tamen ne morti!

(Amalio, kun postploraj okuloj.)

Maljuna Moor. Amalio! sendito de la ĉielo! Ĉu vi venas, por forliberigi mian animon?

Amalio, per pli kvieta tono. Vi perdis belegan filon.

Maljuna Moor. Vi volas diri „mortigis". Ŝarĝita per tiu ĉi atesto mi alpaŝos al la juĝa seĝo de Dio.

Amalio. Ne, ne, malfeliĉa maljunulo! La ĉiela Patro revokis lin al si. Ni estus tro feliĉaj en tiu ĉi mondo. Supre, supre super la sunoj, ni lin revidos denove.

Maljuna Moor. Revidi, revidi! Glavo tranĉos mian animon, kiam mi vidos lin inter la sanktuloj; meze en la ĉielo tremigos min teruroj de la infero! ĉe la rigardado de la eterneco frakasados min la rememoro, ke mi mortigis mian filon!

Amalio. Ho, per sia rideto li forigos la doloran rememoron el via animo! Estu gaja, kara patro! mi estas tute gaja. Ĉu li ne kantis jam al la ĉielaj aŭskultantoj la nomon Amalio sur la serafa harpo, kaj la ĉielaj aŭskultantoj dolĉe ĝin ripetis? Lia lasta ĝemo estis ja Amalio! Ĉu lia unua ĉiela voko ne estos Amalio?

Maljuna Moor. Ĉiela konsolo fluas el viaj lipoj! Li ridetos al mi, vi diras? pardonos? Vi devas resti apud mi, amatino de mia Karolo, kiam mi estos mortanta.

Amalio. Morti estas flugi en liajn brakojn. Feliĉa vi estas! Enviinda vi estas. Kial tiuj ĉi ostoj ne estas putraj? kial tiuj ĉi haroj ne estas grizaj? Ve al mi pro miaj fortoj de juneco! Kun ĝojo mi akceptus vin, vi, sensuka maljuneco, kiu estas pli proksima al la ĉielo kaj al mia Karolo!

(Francisko eniras.)

Maljuna Moor. Aliru, mia filo! Pardonu min, se mi antaŭe estis tro kruela kontraŭ vi!

Mi ĉion al vi pardonas. Mi tiel forte dezirus fordoni mian animon en paco.

Francisko. Ĉu vi jam sufiĉe ploris pri via filo? Kiom mi vidas, vi havas nur unu filon.

Maljuna Moor. Jakobo havis dekdu filojn, tamen pri sia Jozefo li ploris per sangaj larmoj.

Francisko. Hm!

Maljuna Moor. Iru, prenu la Biblion, mia filino, kaj legu al mi la historion pri Jakobo kaj Jozefo! Ĝi ĉiam tiel kortuŝadis min, kvankam mi tiam ne estis ankoraŭ Jakobo.

Amalio. Kiun lokon mi legu al vi? (Prenas la Biblion kaj folias.)

Maljuna Moor. Legu al mi pri la malĝojego de la perdinto, kiam li ne trovis Jozefon inter siaj infanoj kaj vane atendadis lin en la mezo de siaj dek-unu filoj, kaj lian plendan kanton, kiam li eksciis, ke lia Jozefo malaperis por ĉiam.

Amalio, legas. „Tiam ili prenis la veston de Jozefo, kaj ili buĉis kapron kaj trempis la veston en la sangon kaj sendis la makulitan veston kaj alportigis ĝin al sia patro kaj dirigis: tion ĉi ni trovis, — rigardu, ĉu ĝi estas la vesto de via filo, aŭ ne?“ (Francisko subite foriras.) „Sed li ĝin rekonis kaj diris: ĝi estas la vesto de mia filo, kruela besto lin formanĝis, sovaĝa besto disŝiris Jozefon.“

Maljuna Moor, refalas sur la kusenon. Sovaĝa besto disŝiris Jozefon!

Amalio, legas plue. „Kaj Jakobo disŝiris siajn

vestojn kaj metis sakon ĉirkaŭ siajn lumbojn, kaj li funebris pro sia filo longan tempon, kaj ĉiuj liaj filoj kaj filinoj penis lin konsoli; sed li ne lasis sin konsoli kaj diris: kun malĝojo mi malsupreniros...“

Maljuna Moor. Ĉesu, ĉesu! Al mi fariĝas tre malbone.

Amalio, alsaltas, faliginte la libron. Helpu, ĉielo! Kio ĝi estas?

Maljuna Moor. Ĝi estas la morto!... Nigra... naĝas... antaŭ miaj... okuloj... mi vin petas... voku la pastron... li min komuniu... Kie estas... mia filo Francisko?

Amalio. Li forkuris! Dio nin kompatu!

Maljuna Moor. Forkuris... forkuris de la lito de la mortanto?... kaj ĉi tio estas ĉio, ĉio... de du infanoj plenaj de espero... Vi ilin donis... Vi ilin prenis... Via nomo estu...

Amalio, kun subita ekkrio. Mortis! Ĉio mortis! (Foriras malespere.)

Francisko, ensaltas kun ĝojo. Mortis, ili krias, mortis! Nun mi estas mastro. En la tuta kastelo oni kriegas, ke li mortis. Tamen eble li nur dormas? Certe, ha certe! Vere ĝi estas tia dormo, kiun neniam sekvas la voko „bonan tagon“, — dormo kaj morto estas nur du dunaskitoj. Ni interŝanĝu do iom la nomojn! Brava, bonvena dormo, ni nomos vin morto! (Li alpremas al la maljunulo la okulojn.) Kiu nun venos kaj kuraĝos voki min al juĝo? aŭ diri al mi en la vizaĝon: vi estas kanajlo! For do tiun ŝarĝan maskon de kvieteco kaj virto! Nun vi vidos la nudan

Franciskon, kaj teruro vin kaptos! Mia patro superŝutadis siajn postulojn per sukero, faris el sia posedaĵo familian rondeton, li sidadis kun afabla rideto antaŭ la pordo kaj salutadis ĉiujn kiel fratojn kaj infanojn. Miaj brovoj pendos super vi kiel fulmotondraj nuboj, mia sinjora nomo sin portados super tiuj ĉi montoj kiel minaca kometo, mia frunto estos via barometro! Li karesadis la nukon, kiu obstine sin levis kontraŭ li. Sed mi ne amas rideti kaj karesi. Mi hakos al vi la akrajn spronojn en la karnon, kaj mi uzos la senkompatan skurĝon. En mia posedaĵo mi alkondukos al tio, ke terpomoj kaj malforta biero fariĝos regalaĵo por festoj, kaj ve al tiu, kiu renkontiĝos al miaj okuloj kun plenaj kaj ruĝaj vangoj! Paleco de malriĉeco kaj de sklava timo estas mia amata koloro; en tiun ĉi livreon mi vin vestos. (Li foriras.)

Akto tria

Sceno unua

Amalio, en la ĝardeno, ludas sur liuto.

Bela per beleco de anĝelo,
El junuloj estis li unua,
Kun rigardo kvazaŭ la ĉielo
Spegulita en la maro blua.

Fajre brulis liaj ĉirkaŭprenoj,
Forte batis koro ĉe la koro,
Korpo estis kvazaŭ en katenoj
Kaj spirito revis en adoro.

Liaj kisoj — paradiza ĝuo!
Kvazaŭ brulas flam' en flam' alia,
Kvazaŭ harpaj sonoj en kunfluo
Por ĉiela ludo harmonia.

Al animo flugis la animo,
Tremis lipoj, vangoj la brulantaj,
Kaj fandite tuta mond' sen limo
Vage naĝis ĉirkaŭ la amantaj.

For li estas, vane sen espero
Vokas lin la krio de korpremo,
Kaj la tuta ĝojo de la tero
Flugis for, kaj restis sole ĝemo!

(Francisko eniras.)

Francisko. Jam denove ĉi tie, obstina revistino? Vi forŝteliĝis de la gaja festeno kaj vi difektis al la gastoj ilian ĝojon.

Amalio. Estas domaĝo pri tiu senkulpa ĝojo! En iliaj oreloj kredeble murmuras ankoraŭ la funebra kanto, kiu akompanis vian patron al la tombo. . . .

Francisko. Ĉu vi volas do eterne funebri? Lasu la mortintojn dormi kaj feliĉigu la vivantojn! Mi venas. . . .

Amalio. Kaj kiam vi reiros?

Francisko. Ho ve! Ne havu tian malluman fieran vizaĝon! Vi malĝojigas min, Amalio. Mi venas, por diri al vi . . .

Amalio. Mi devas do aŭskulti, Francisko de Moor fariĝis ja reganta sinjoro.

Francisko. Jes, bone, ĝi estas ĝuste tio, pri kio mi volis paroli kun vi. Maksimiliano foriris dormi en la tombo de la patroj; mi estas sinjoro. Sed mi volus esti ĝin tute plene, Amalio. Vi scias, kio vi estis por nia domo, vi estis tenata kiel filino de Moor, eĉ la morton transvivis lia amo al vi, — tion vi ja neniam forgesos?

Amalio. Neniam, neniam. Kiu do povus tion ĉi tiel facile fordiboĉi ĉe gaja festeno!

Francisko. La amon de mia patro vi devas rekompenci en liaj filoj, kaj Karolo mortis... Vi miras? vi ricevas kapturnon? Jes, efektive, la penso estas tiel flate alta, ke ĝi eĉ la fierecon de virino ebriigas. Francisko premas per la piedoj la esperojn de la plej nobelaj fraŭlinoj, Francisko venas kaj proponas al

malriĉa senhelpa orfino sian koron, sian manon kaj kune kun ĝi sian tutan oron, ĉiujn siajn kastelojn kaj arbarojn. Francisko, la enviata, la timata, deklaras sin propravole sklavo de Amalio.

Amalio. Kial la fulmo ne fendas la malpian langon, kiu elparolas la kriman vorton! Vi mortigis mian amaton, kaj Amalio nomu vin sia edzo! Vi...

Francisko. Ne tiel kolere, mia princidina moŝto! Estas vero, ke Francisko ne fleksas sin antaŭ vi kiel kolombumanta Celadono; certe li ne kutimiĝis, simile al la sopiranta Arkadia paŝtisto, krii siajn amajn plendojn al la eno de la grotoj kaj rokoj, — Francisko parolas, kaj se oni ne respondas, li *ordonos*.

Amalio. Vi, vermo, ordoni? al mi ordoni? kaj se oni resendos al vi la ordonon kun ridego?

Francisko. Tion vi ne faros. Mi scias ankoraŭ rimedojn, kiuj tre bone povas fleksi la fierecon de malhumila obstinulino — monaĥinejo kaj muroj.

Amalio. Brave! belege! kaj en la monaĥinejo kaj inter la muroj esti por ĉiam liberigita de via baziliska rigardo kaj havi sufiĉe da libera tempo, por pensi pri Karolo kaj fordoni sin al li. Bonvenon al via monaĥinejo! donu, donu viajn murojn!

Francisko. Haha! tia estas la afero? Gardu vin! Nun vi instruis al mi la arton, kiel mi devas vin turmenti. Tiun ĉi eternan ĥimeron pri Karolo mia rigardo elvipados al vi el la

kapo simile al fajrohara furio; la teruraĵo Francisko staros ĉiam garde malantaŭ la bildo de via amato, simile al la sorĉita hundo, kiu kuŝas sur subteraj kestoj da oro, — per la haroj mi vin trenos en la preĝejon, kun la glavo en la mano mi elpremos al vi el la brusto la edzecan ĵuron, vian liton virgulinan mi okupos per forto, kaj vian fieran ĉastecon mi venkos per ankoraŭ pli granda fiereco.

Amalio, donas al li vangofrapon. Antaŭe prenu ĉi tion kiel doton.

Francisko, furioze. Ha! dekoble kaj centoble tio ĉi estos venĝita! Ne mia edzino — tiun ĉi honoron vi ne havos — mia amaĵistino vi estos, tiel ke la honestaj vilaĝanedzinoj montrados vin per fingroj, kiam vi permesos al vi iri tra la strato. Grincu per la dentoj, ŝprucigu fajron kaj morton el viaj okuloj — min amuzas la kolerego de virino, ĝi faras vin ankoraŭ pli bela, pli dezirinda. Venu, — tiu ĉi kontraŭbatalado ornamos mian triumfon kaj spicos al mi la volupton en perforte akirita ĉirkaŭprenado, — venu kun mi en mian ĉambron, mi brulas de dezirego, — nun tuj iru kun mi. (Li volas fortreni ŝin.)

Amalio, ĵetas sin sur lian kolon. Pardonu min, Francisko! (Dum li volas ŝin ĉirkaŭpreni, ŝi deŝiras al li la glavon de lia flanko kaj rapide resaltas.) Ĉu vi vidas, malbonulo, kion mi povas nun fari kun vi? Mi estas virino, sed virino furioza, — kuraĝu nun ekpalpi mian korpon per malĉasta tuŝo, — kaj tiu ĉi ŝtalo trapenetros la mezon de via voluptavida brusto,

kaj la spirito de mia onklo gvidos por tio ĉi mian manon. Tuj kuru for! (Ŝi forpelas lin.)

Amalio. Ha, kiel bone estas al mi! Nun mi povas libere spiri, mi sentas min forta, kiel flama ĉevalo, furioza kiel tigrino, kiu kuras post la triumfanta rabinto de ŝiaj infanoj... En monaĥinejon, li diras, — dankon al vi por tiu ĉi feliĉa elpenso! Nun la trompita amo trovis sian rifuĝejon, — la monaĥinejo, la kruco de la Savinto estas la rifuĝejo de la trompita amo. (Ŝi volas foriri.)

(Hermano timeme eniras.)

Hermano. Fraŭlino Amalio! Fraŭlino Amalio!

Amalio. Malfeliĉulo! kial vi min malhelpas?

Hermano. Tiun ĉi pezegon mi devas deĵeti de mia animo, antaŭ ol ĝi ĝin enpremos en la inferon. (Ĵetas sin teren antaŭ ŝi.) Pardonon! pardonon! Mi vin tre ofendis, fraŭlino Amalio.

Amalio. Leviĝu! Iru! mi nenion volas scii. (Ŝi volas foriri.)

Hermano, retenante ŝin. Ne! Restu! Pro Dio! Pro la eterna Dio! Vi devas ĉion scii!

Amalio. Eĉ ne unu sonon plu! Mi vin pardonas, — iru hejmen en paco. (Ŝi volas forrapidi.)

Hermano. Aŭdu do nur unu solan vorton, — ĝi redonos al vi vian tutan trankvilecon.

Amalio, revenas kaj rigardas lin kun miro. Kiel, amiko? Kiu en la ĉielo aŭ sur la tero povas redoni al mi mian trankvilecon?

Hermano. Tion ĉi povas fari unu sola vorto de miaj lipoj. Aŭskultu min!

Amalio, prenante lian manon kun kompato. Bona homo, ĉu unu vorto de viaj lipoj povas disrompi la riglilojn de la eterneco?

Hermano, leviĝas. Karolo ankoraŭ vivas!

Amalio, kriante. Malfeliĉa!

Hermano. Tiel estas... Ankoraŭ unu vorton, — via onklo...

Amalio, kun minaca mieno. Vi mensogas!

Hermano. Via onklo...

Amalio. Karolo ankoraŭ vivas?

Hermano. Kaj via onklo...

Amalio. Karolo ankoraŭ vivas?

Hermano. Ankaŭ via onklo... Ne elperfidu min. (Rapide forkuras.)

Amalio, staras longan tempon kvazaŭ ŝtonigita. Poste ŝi sovaĝe ekkrias kaj elkuras post Hermano. Karolo ankoraŭ vivas!

KSIĄŻNICA PODLASKA
im. Łukasza Górnickiego
Nr 134609
Czytelnia Książek
w Białymstoku

Berliner Spezial-Druckerei GmbH., NW 21, Alt-Moabit 105.

Biblioteko

raĵoj de Germana
alaktualiĝis.

ernacia kriminal-

ektitaj Poemoj.
Friedrich Pillath.

bro. Ia volumo:

La kantistino.
tradukis Eugen

phraim: Natan
en kvin aktoj.
. Minor.

itaj Rakontoj
ulgara tradukis
eparo.)

kartonitaj.

Prezoj laŭ nia plej nova katalogo.

(La kolekto estas daŭrigota.)

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G.m.b.H.
Berlin kaj Dresden

El Dramoj

ESPERANTA

Unua

No. 1. **Legolibreto,** [illegible]

No. 2. **Fabeloj de A** [illegible] tradukitaj el dana [illegible] Fr. Skeel-Giörling.

No. 3. **Bona Sinjorino,** novelo de E. Orzeszko, tradukita el pola lingvo de Kabe.

No. 4. **Rusaj Rakontoj** de Mamin Sibirjak, tradukitaj el rusa lingvo de N. Kabanov.

No. 5. **Don Kiĥoto en Barcelono,** tradukita el hispana lingvo de Fr. Pujulà y Vallès.

No. 6. **El la Biblio,** trad. Dro L. L. Zam[illegible]

No. 7. **El** [illegible] tradukit[illegible] de Dro [illegible]

No. 8. **El** [illegible] toj), es[illegible] L. L. Z[illegible]

No. 9. **Pr**[illegible] logoj d[illegible] metis J[illegible]

Noj. 10-11 [illegible] **panaj Rakontoj.** El japana lingvo kunmetis Ĉif Toŝio.

No. 12. **Amoro kaj Psiĥe** de Lucius Apulejus, el latina lingvo trad. Emilo Pfeffer.

No. 13. **Bulgaraj Rakontoj,** el bulgara lingvo tradukis At. D. Atanasov.

Noj. 1[illegible] Rea[illegible] de H[illegible] vega[illegible]

No. 16. [illegible] kunn[illegible]

No. 17. [illegible] trad[illegible]

Aehermann, 15 Mj, 1 M. Dr.

No. 19. **Sinjoro Herkules.** Unuakta burleskaĵo de Georg Belly, el germana lingvo tradukis H. Arntz kaj M. Butin.

No. 20. **La lasta Usonano** de J. A. Mitchell, el la angla lingvo trad. Lehm. Wendell.

No. 21. **Hungaraj Rakontoj** de Ferenc Herczeg, el hungara lingvo trad. A. Panajott.

No. 22. **Nord-germanaj Rakontoj** de Heinrich Bandlow, [illegible] tradukis [illegible]

[illegible] noj de [illegible] tradukis [illegible]

[illegible] ner de [illegible] franca [illegible] po. [illegible] Nigra [illegible] istaller. [illegible] o Wilh. Christaller.

No. 26. **La intervidiĝo kaj Nekonita Dialogo** de Alfred de Vigny, el franca lingvo trad. Sam. Meyer.

No. 27. **La Patrino** de E. Zahn. El la Germana trad. J. Ŝmid.

No. 28. **Elzasaj Legendoj.** El [illegible] is Char-

[illegible]).Sub la [illegible] loĝanto [illegible] J. Por- [illegible] J. Borel. [illegible] rantoj. [illegible] nale ver- [illegible] nidt.

Prezoj laŭ nia plej nova katalogo. La kolekto estas daŭrigota.

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel GmbH.,

Berlin kaj Dresden

Książnica Podlaska
im. Ł. Górnickiego w Białymstoku
KP-BG-0489479
134609

Berliner Spezial-Druckerei G. m. b. H., NW 21, Alt-Moabit 105.